

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO
APERAS MONATE
Redaktejo kaj administrejo: Pl. „Sveta Nedelja". № 6, Sofio.

ABONPREZO:
Por Bulgario — 20 leva
Por Eksterlando — 5 spm.

JARO UNUA,
Numeroi 3.
Septembro, 1919.

Нашиятъ напрѣдъкъ.

Идеята за международенъ езикъ или по точно за международния езикъ Esperanto никога не е заглъхвала въ България. Нѣщо повече: числото на нейнитѣ привърженици постоянно е растло. И тя е вербувала и вербува своитѣ поддържници еднакво както между професори, учители и ученици, тъй и между търговци, занаятчии и други професии.

Отъ войнитѣ насамъ, обаче, датира единъ такъвъ подемъ на есперантизма въ България, че се туря началото на новъ животъ на есперантското движение у насъ.

Незгодитѣ, които прѣзъ войната изпита нашиятъ народъ поради неразбирането му съ хората отъ чужди нему нации съ непознати езици, подчертаха *практически* необходимостьта отъ едно срѣдство за международно разбиране. За всички стана ясно не само това, че българскиятъ езикъ е недостатъченъ за разбиране съ хората отъ другитѣ нации, но нѣщо повече: че даже и познаването на единъ или два чужди езици неможе да помогне.

А еднажъ това съзнато, почувствано осезателно, почвата за бързото възприемане идеята за международния езикъ е на лице.

Днесъ може да се каже, безъ страхъ на прѣувеличение, че всѣки единъ българинъ, пъкъ и всѣки другъ, който е участвалъ въ войната, е много по близко до възприемане идеята за международния езикъ, отъ когато и да е било други пѫть. Защото днесъ нуждата отъ международенъ езикъ се почувства еднакво, както отъ граждани тъй и отъ селяни, както отъ учени, тъй и отъ неуки.

И съ това се обяснява, именно, голѣмиятъ напрѣдъкъ на есперантизма въ България. Вѣрно е, че има и други странични причини (между другитѣ: голѣмото общение, което създаде войната, както и наклонностьта къмъ пó-усилена умствена работа) за засилването на есперантското движение у назъ, но пакъ на първо мѣсто стои практическото съзнание на нуждата отъ международенъ езикъ.

А напрѣдъкътъ, който есперантизъмътъ направи и прави у България е дѣйствително голѣмъ. Само въ продължение на нѣколкото мѣсеца слѣдъ свършване на войната, числото на дружественитѣ членове, както това се изнесе на конгреса, е надминало 400 души (прѣди войната тѣ бѣха много по малко отъ сто!), като въ повече отъ 15 града и села имаме и мѣстни пропагандически комитети. А вънъ отъ организиранитѣ чрѣзъ Дружеството есперантисти има стотици други, които по една или по друга причина още не сѫ се записали за членове на дружеството, както и единъ голѣмъ брой съчувственици, които безъ да сѫ още есперантисти, съчувстватъ на идеята за международния езикъ.

Всичко това неможе да не ни радва. Защото всѣки единъ отъ назъ знае, че ние ще постигнемъ нашата цѣль, когато Esperanto стане втори, спомагателенъ езикъ на всѣки интелегентенъ човѣкъ и че увеличението числото на привърженицитѣ на идеята за международния езикъ все повече и повече ни приближава къмъ тази цѣль.

Но, радвайки се на нашия напрѣдъкъ, да не забравяме, че днесъ е най добриятъ моментъ за работа. Днесъ когато почвата е подготвена, когато нуждата отъ срѣдство за международно разбиране е практически почувствана, дългъ на всѣки есперантистъ е да посочи на всѣкиго и на всички, че това срѣдство за международно разбиране сѫществува, че то е създадено въ лицето на лекия и напълно издържалия изпита на живота международенъ езикъ Esperanto.

Дѣйствайки така, ние ще ускоримъ крайния успѣхъ, който за всички ни е безсъмнѣнъ, на прѣдназначения да прави епоха въ живота на човѣчеството международенъ езикъ Esperanto.

Изъ историята на международния езикъ и Есперанто.

Продължение.

Обикновено на Лайбница се гледа като баща на „идеята за всесвѣтски езикъ“, но тя е занимавала и редъ други видни учени като Декартъ, Баконъ, Байронъ и пр. За първи пѫть своята идея по тоя въпросъ Лайбницъ е изложилъ въ своятъ трудъ „Dissertatio de arte combinatoria, Lipsiae 1666“ и тази идея го е занимавала до края на живота. Споредъ него, за постигане цѣльта е било нужно да се изнамѣрятъ за всѣки прѣдметъ и идея знаци, които трѣбвало

да бждатъ подобно на алгебричнитѣ. Още прѣди него Д-ръ Joh. Joach. Becher (1661 г.) е прѣдложилъ да се нумериратъ думитѣ въ цѣлия рѣчникъ и тѣзи числа се приематъ за общъ писменъ езикъ, обаче, имено отъ Лайбницъ идеята за езикъ чрѣзъ знаци хваща здрави корени.

Нека още тукъ споменемъ, че въ правенитѣ опитк ясна идея за международенъ спомагателенъ езикъ, т. е. такъвъ, който не отрича сжществуването на матернитѣ езици и да е говоримъ отъ всички, се забѣлѣзва едва по късно. Дълго врѣме въ стрѣмленията се съзира идеята за създаване универсаленъ, всесвѣтски езикъ, или пъкъ просто се цѣлѣло създаването само на писменъ, но не и говоримъ езикъ (цифри, рисунки, нотни знаци и пр.) — „пазиграфия или изкуство да се разбира човѣкъ, съ помощьта на общи писани знаци, съ всички нации, каквито и езици да говорятъ тѣ, стига да имъ сж извѣстни тѣзи общи знаци". Въ Германия, Франция, Англия, Испания, Унгария, Русия, Дания и пр сж правени множество опити и прѣдложения отъ частни лица или академии и правителства. Даже вече и прѣзъ 1811 год. Академията на Науकитѣ въ Копенхагенъ е опрѣдѣлила премия за прѣдложената най лесна и осжществима пазиграфия. Съ течение на врѣмето, обаче, се е разбрало, че това сж нѣща неосжществими и може да се желае само осжществяването на международенъ спомагателенъ езикъ и то не само писменъ, но и говоримъ.

Въ 1668 г. Yohn Wilkins издава своя грандиозенъ пазиграфиченъ трудъ An essay towards a real character and philosophical language, дѣто всички идеи съ своитѣ знаци сж наредени по видове, класи и подкласи. Слѣдъ това слѣдватъ множество пазиграфични опити и прѣдложения, между които по важни като трудове сж: на Anastasius Kircher, Peter Porele, Joh. Upperdorf (1679—80), Andreas Müller (1681), Joh. Caramuel (1687), йезуита Resuier (1684), David Solbrig (1725), унгареца Kalmar (1772), Chr. G. Berger (1779) Delormel (1795), Vater (с. г.), de Maimieux (1797), Budet (с. г), Chambry (с. г.) Sicard (1796), лингвиста-педагогъ Wolke (1797). Fry (1799) G. E. Busch (с. г.), I. S. Vater (с. г.), Näther (1805), A. Ronzi (1840), баронъ de Gablenz, Moses Paic, Don Sanibaldo de Mas, Anton Bachmaier, Albert Walter и др. Но всички тѣзи опити безъ изключение сж останали само кабинетни трудове, безъ ни най-малко практическо приложение.

Прѣзъ 1808 г. придворниятъ баварски съвѣтникъ Friedr. Imman. Niethammer, въ своя критиченъ трудъ Ueber Pasigraphik und Ideographik се опълчава остро противъ всички дотогавашни опити и съвършено вѣрно дохожда до заключение, че по символиченъ пжть, безразлично да ли той ще е йероглифчи знаци, числа, или знаци на звуци (букви), употрѣбени като знаци на мисли, никога не ще се дойде до цѣльта. И слѣдъ редъ разсжждения, той вади заключение, че само имитиращъ природнитѣ езици „фонетиченъ слововъ езикъ" може да разрѣши проблемата за всесвѣтски езикъ.

И дѣйствително отъ първата половина на 19 вѣкъ започва да личи стрѣмление за създаване не пазиграфиченъ, а фонетиченъ и

подобенъ на природнитѣ, езикъ, а все по-широко започва да си пробива пжть и идеята, че този езикъ трѣбва да е не универсаленъ, а само международенъ спомагателенъ. Почти ежегодно се явяватъ нови трудове, кой отъ кой по оригинални и интересни, даже много отъ тѣхъ отъ висока научна стойность, но болшинството недовършени проекти. Едни отъ авторитѣ даватъ реформирани стари или сега сжществуващи езици. Други измислятъ съвършено нови названия за всички прѣдмети и идеи, но всички тѣзи трудове оставатъ само писани на книга, оказвайки се все практически неприложими. Не единъ опитъ за международенъ езикъ е печатанъ даже и слѣдъ явяването на Есперанто, но пакъ съ сжщата сждба на прѣдидущитѣ, при все че, може би, нѣкои, като научни трудове, притежаватъ голѣми достойнства. „Латински езикъ нагласенъ за търговия", „Langue bleue", „Universul" и много други е трѣбвало съ самото си раждане да прѣстанатъ да живѣятъ.

Първиятъ изкуственъ езикъ, който е ималъ щастието да се радва на нѣколко годишенъ животъ, спечелилъ е доста привърженици и е добилъ извѣстно практическо приложение, това е „Волапюкъ" (1880 г.). Авторътъ му, германскиятъ духовникъ Yohann Martin Schleyer, е далъ езикъ построенъ върху принципа иа най голѣмата краткость. Всички думи той е черпилъ изъ европейскитѣ езици, обаче ги е измѣнилъ до неузнаваемость (напр. Volapük произлиза отъ английскитѣ думи world и speak), изхвърлилъ е трудно произносимото за нѣкои източни народи *r*, а оставилъ неинтернационалнитѣ ä, ö, *ü* и пр. Въ сравнение съ по раншнитѣ опити, Волапюкъ е билъ твърдѣ съвършенъ и лесенъ, главно по отношение на граматиката (но не и рѣчника), бързо е ималъ доста широко разпространение въ Европа и даже сж били уредени международни конгреси на волапюкиститѣ, но слѣдъ третия и послѣденъ такъвъ (Парижъ, 1889) болшинството волапюкисти сж минали къмъ Есперанто. За загинването на Волапюкъ е оказала влияние голѣмата трудность за заучването му и грубото звучене при говоренето му, което и безъ това е било извънредно трудно.

(Слѣдва) *П. К-въ.*

Esperanto tra la mondo.

Въ всички страни есперантскитѣ организации сж подели трѣскава дѣйность. Едно слѣдъ друго се подновява издаването на спрѣли прѣдъ войната списания, непрѣстано се отварятъ нови курсове за изучаване езика, постоянно се правятъ постжпки прѣдъ респективнитѣ учреждения за въвеждане прѣподаването на Есперанто въ учебнитѣ заведения, а разни институти и др. го приематъ за международната си кореспонденция.

Въ Виена сж били пскανени учителитѣ да се съвѣщаятъ по въпроса за отправяне петицня до Министра на Нар. Просв. за въвеждане изучаването на Есперанто въ училищата.

Въ Русия, по рѣшение на Комисарството за Народното образувание, е учредена комисия, която да проучи най основно въпроса за въвеждане незадължителното изучаване междунар. езикъ. Членъ на комисията е познатия на българскитѣ есперантисти, старъ съмишленикъ Евстифеевъ. Официалниятъ съвѣтски вѣстникъ „Извѣстия" публикува статии относно международния езикъ и Есперанто.

Въ Мексико въ училището на висшитѣ науки се води курсъ, посѣщаванъ и отъ много учители.

Въ Щата Sergipe парламентътъ е гласувалъ законъ (6 параграфа), съ който се отмѣняватъ всички по ранщни наредби и се въвежда въ прогимназиитѣ и гимназиитѣ незадължителното изучаване на Еспер‹нто. Тоя законъ дава право, при конкурси за постжпване въ гимназиитѣ или за назначаване отъ свършившитѣ учители, при еднакви условня, да се прѣдпочитатъ тѣзи, които притежаватъ атестация за Есперанто.

Въ Рио де Женейро градскиятъ съвѣтъ е разрѣшилъ незадължителното изучаване на Есперанто въ основнитѣ и занаятчийски училища и прогимназиитѣ.

Въ Швеция конгресътъ на пацифиститѣ, състоялъ се на 27 априлъ н. г. въ гр. Скара е взелъ слѣдната резолюция:

„Конгресътъ на мира, състоялъ се въ гр. Скара, съ присъединяването си къмъ декларацията на 50 официялни прѣдставители на неотдавна състоялия се въ Бернъ международенъ конгресъ за Лига на Народитѣ, заявява, че въвеждането на Есперанто като неутраленъ международенъ езикъ е едно отъ най главнитѣ условия за разбирателството между народитѣ и необходима база за Лигата на Народитѣ. Възприемайки желанието на бернския конгресъ, ние молимъ пацифистическитѣ организации въ разнитѣ страни да поддържатъ материално и морално есперантското движение, да уреждатъ курсове въ организациитѣ и употрѣбяватъ Есперанто за международнитѣ си сношения".

Modeloj de esperanta stilo.

(Sub tiu Ĉi*) titolo estos presataj frazoj, artikoloj k. a. skribitaj aŭ korektitaj de l'aŭtoro de Esperanto — D-ro L. Zamenhof).

Infano ne estas matura homo. — Jen estas pomo. — Mi parolas pri leono. — Venu kune kun la patro. — La filo staras apud la patro. — Mi manĝas per la buŝo kaj flaras per la nazo. — Ni vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj — Mi venas de la avo, kaj mi iras nun al la onklo. — Mi deziras al vi bonan tagon, sinjoro! — Bonan matenon! — ĝojan feston! (mi deziras al vi) — Kia ĝoja festo! (estas hodiaŭ). — Sur la Ĉielo staras la bela suno — En la tago ni vidas la helan sunon, kaj en la nokto ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn. — Mi havas pli freŝan panon, ol vi. — Ne, vi eraras, sinjoro: via pano

---

*) Pro nehavo de la malgranda litero ĉ estas anstataŭzata la Ĉ.

estas malpli freŝa, ol mia. — El Ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna. — El Ĉiuj siaj fratoj Antono estas la malplej saĝa.

* * *

La artikolo „la“ estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj; ĝia uzado estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, Ĉar ĝi estas oportuna, sed ne necesa. Anstataŭ „la“ oni povas ankaŭ diri „l“ (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo).

Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas); internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (= de la tuta mondo); unutaga (= kiu daŭras unu tagon); unuataga (= kiu estas en la unua tago); vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo); matenmanĝi. tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (= pago por la abono).

* * *

Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas Ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon „n“; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu loko); tiel same ni ankaŭ diras: la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon“, kaj la vortoj „ĝardenon“, „tablon“ staras tie Ĉi en akuzativo ne Ĉar la prepozicioj „en“ kaj „sur“ tion Ĉi postulas, sed nur Ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj la tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj kazoj ni uzus la finiĝon „n“ tute egale, Ĉu la prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon). — Mi restos hodiaŭ dome — Jam estas tempo iri domen. — Ni disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren. — Flanken, sinjoro! — Mi konas neniun en tiu Ĉi urbo. — Mi neniel povas kompreni, kion vi parolas. — Mi renkontis nek lin, nek lian fraton (aŭ mi ne renkontis lin, nek lian fraton).

En nord' unu pino . . .

(El Heine).

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
ĝin kovras per tomba tolaĵo.

ĝi songas, ke palmo gracia
En unu dezert' orienta
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

L. Zamenhof.

Esperanto tra la Bulgario.

La komuna jara kunveno okazis, kiel oni estis sciigita, je la 24-a de Aŭgusto en Sofio. Kvankam la pli multaj de la societaj membroj ne povis bedaŭrinde veni pro la nunaj vojaĝk ndiĈ j Ĉeestis Ĉirкaŭ 100 samideanoj kun delegitoj de Plovdiv, Karlovo, Kneĵa, B. Slatina, Ruse kaj aliaj. La aŭditorio № 45 de la Universitato estis bele ornamita per la naciaj flagoj de preskaŭ Ĉiŭj ŝtatoj kaj tiu de Esperantio. Ekstere sur la du flankoj de enirejo svingis sin la du grandaj verdstandardoj de Esperanto!

La kunveno estis malfermita de la prezidanto de la Centra Propaganda Komitato s-ro Sim. N. P tkov, kiu per fortaj vortoj substrekis nian noblan celon — sur neŭtrala lingva fundamento fari de l'homaro unu grandan rondon familian — celo inda al homoj de l'idealo, kaj atentigante la kongresanojn sur la signifo de nia unua esperantista kunveno post la milito, li montris la veran vojon, kiun Ĉiuj esperantistoj en Bulgario sekvu por efektivigi nian idealon: per organizado kaj sindonema laboro al la venko. Parolante pri la terura pasinta milito, li petis la kongresanojn honorigi la memoron de nia kara neforgesebla Majstro D-ro Zamenhof — la plej multekosta viktimo donita de la tuta esperantistaro dum la milito — kaj ankaŭ tiun de Ĉiuj bulgaraj kaj fremdlandaj samideanoj perditaj en la milito. Kaj la Ĉeestantoj piedstarante esprimis sian honorigon. Poste li proponis al la kunveno s on Aktarĝiev — kiel prezidanto de la kongreso kaj la lasta estis unuanime akceptita per aplaŭdoj. Okupante la presidlokon s-ro Aktarĝiev kore dankis la kongresanojn por la donita fido al li. Kortuŝite li bondeziris al la kunveno sukcesplenan laboron. Post tio s-ro Hitrov — Sofia esperantisto — salutis la bulgarajn esperantistojn de la nomo de la samideanoj de Budap st, Berlin, Moskva, Helzingfors k. a., kie li estis lastatempe inter ili kaj esprimis sian tutкoran dankon al la esperantistoj en la nomitaj urboj por la faritaj al li servoj Sekvis la legado de la multaj saluttelegramoj al la kongreso de preskaŭ Ĉiuj lokoj de Bulgario kaj kies enhavo estis aŭskultita kaj akceptitaj de Ĉiuj per longaj aplaŭdoj.

La prezidanto invitis s-ron St. Minkov, la ĝisnuna sekretario de C. P. K legi la raporton pri la societa vivo dum la pasintaj societaj jaroj 1914/15 kaj 1918/1919. Antaŭ la legado de la raporto s-ro Minkov en longa esperanta parolado esprimis la ĝojon, ke malgraŭ la teruraj okazintaĵoj, la Bulgara Esperantista Societo ne pereis, sed pli forte kreskis kaj progresis Krom tio li atentigis la bulgarajn esperantistojn sur la graveco de l'hodiaŭa momento: la triumfo de la demokratiaj ideoj en la mondo kaj la esperebla proksima kunfratiĝo de la diversaj popoloj. Kaj li rimarkis kiom necesa estas, por atingi Ĉi tion, la kunlaborado de Ĉiuj samideanoj. Li finis per Ĉi tiu alvoko „Nun kiam la hela lumo de la paco ekaperas sur la horizonto, nova vivo komenciĝas por nia kara Esperanto kaj la nova tempo postulas antaŭ

Ĉio seriozajn laboremulojn, bonajn konstruantojn, sindonemajn pionirojn. Pretigu vin al laboro, karaj samideanoj, kaj kuraĝe ne flankiĝante iru Ĉiam antaŭen por la baldaŭa triumfo de nia kara lingvo. Vivu Esperanto, vivu la Bulg. Esp. Societo! „Longaj aplaŭdoj sekvis. La raporto pri la societa vivo estis legita post tio. Je 51 societaj membroj dum 1914/15, la societo atingis pli ol 420 dum la lasta jaro. Estas rimarkinda la renovigo de l'provincaj lokaj propagandaj komitatoj en Karlovo, Kneĵa, Vidin, Gjumjurĝina, Varna, Lukovit, Panagjuriŝte, ŝumen, Kozloduj, Haskovo, Ruse kaj Sofia. La financa stato estas Ĉi tia:

1914/15		1918/19	
Enspezoj	148·97 levoj	Enspezoj . . .	1.646·62 levoj
Elspezoj	36·55 „	Elspezoj	938·20 „
En kaso . .	112 42 levoj	En kaso. .	708·42 levoj

Por la organo:

Enspezoj:		Elspezoj:	
De abonoj . . .	3.300·— levoj	Por presado	600 levoj
Monhelpoj . . .	670 10 „	Alsendado	50 „
En tute . .	3.970 10 levoj	En tute . .	650 levoj

3970.10 — 650 = 3320·10 en kaso.

La tuta raporto estis unuanime akceptita kaj dankante la ĝisnunan C. P. K. por la farito de ĝi, la Kongreso liberigis la lastan de respondeco.

Sekvis la voĈdonado kaj la elekto de nova Centra Propaganda Komitato. Estis elektitaj laŭ la ricevitaj voĈoj la s-roj: St. Minkov. Sim. N. Petkov, R. Bojaĝiev, P. Kolev, M. Georgiev, G. Atanasov, kaj G. Gaŝevski. Kontrola komitato: G. Fandikov, N. ŝiŝeĝiev kaj P. Taŝkov.

Postagmeze estis legitaj du paroladoj: 1) „La propagando de Esperanto en Bulgario" de s-ro At. D. Atanasov kaj; 2) „Socializmo kaj Esperanto" de s-ro St. Minkov. Post la legado de la unua, komencis la diskutado pri la diversmanieroj de la agado kaj la propagando de nia kara lingvo en la urboj kaj la vilaĝoj inter kiuj propagandmanieroj oni citis: korespondadon per esp. poŝtkartoj kaj leterkovriloj, esp. signojn, eldonadon de broŝuretoj, de alvokoj, de afiŝoj k. t. p., aranĝon de esp. ekspozicioj, de festoj, malfermon de kursoj k. multajn aliajn. En tiu Ĉi longa diskutado partoprenis preskaŭ Ĉiuj kongresanoj kiel same en tiu pri la plibonigo kaj la disvastigo de la societa organo „Bulgara Esperantisto". Post kelkaj esprimitaj opinioj oni decidis, ke la abonprezo de l'organo restu la sama — 20 levoj jare (por 10 numeroj) kaj ke la redakta komitato povu reguladi ĝian enhavon kaj la pligrandigon laŭ la financoj por Ĉi tiu celo.

Estis farita propono de s-ro St. Minkov, ke oni donu kian ajn monpagon al la estonta sekretario de C. P. K., sed tiu Ĉi propono ne estis akceptita.

Inter la aliaj gravaj kongresaj decidoj estas tiuj Ĉi: 1) La ŝanĝoj faritaj en la societa regularo de la sekvantaj artikoloj, akceptitaj en la jara kunveno:

Чл. 19. Дѣйствителнитѣ членове плащатъ въ централната каса 6 лева гопишенъ членски вносъ.

Чл. 20. За учащи се и войници годишниятъ членски вносъ е 3 лева.

Чл. 21. Спомагателнитѣ членове плащатъ най-малко 3 лева годишенъ членски вносъ.

Чл. 22. Членскиятъ вносъ трѣбва да се изплати до края на м. декември. Новозаписалитѣ се членове плащатъ членския си вносъ при записването си за цѣлата текуща година.

Чл. 64. Измѣненията се приематъ, ако за тѣхъ сѫ гласували двѣ трети отъ гласувалитѣ членове въ общото годишно събрание. Въ противенъ случай прѣдложението пада, но може да се поднови на слѣдващата дружествена година.

2) La C. P. K. faru la necesajn klopodojn Ĉe la Ministrejoj de la popola Instruado kaj tiu de la Komerco, por ke Esperanto estu akceptata kiel fakultativa lingvo en la lernejoj, precipe en la komercaj kaj la profesiaj.

3) Estu sendata telegramo al la C. O. de Universala Esp. Asocio en Bern (Svisio) salutante Ĉiujn esp. societojn kaj esperantistojn en la tuta mondo kaj bondezirante al ili, ke nun post la milito ni Ĉiuj denove eklaboru por la pli intima kaj pli bona kunfratiĝo de la diversaj popoloj en la mondo evitante tiel la estontajn interhomajn buĈadojn.

Fine s-ro Sim. N. Petkov esprimis al la kongresanoj la dankojn de la nova C. P. K. por la donita fido al la novaj komitatanoj, kaj poste la kongreso estis fermita.

Ni devas Ĉi tie rimarkigi je la granda impreso, kiun faris al la Ĉeestantoj ĵus alvenintaj du fraŭlinoj de la panagjuriŝta lernista grupo, kiuj alportis multajn esp. flugfolietojn por propagando sub titolo: „Ni lernu Esperanton". Jen unu imitinda bona ekzemplo por Ĉiuj grupoj!

La nova centra prop. komitato estas formita tiel: Prezidanto — Sim. N. Petkov, subprezidanto — G. Atanasov, sekretario — St. Minkov, kasisto — M. Georgiev, bibliotekisto — R. Bojaĝiev. Redakta komitato: Sim. N. Petkov. G. Atanasov, P. Kolev, R. Bojaĝiev кaj G. Gaŝevski. Kiel oni vidas Ĉi tiu numero estas eldonita en 12 paĝoj, kaj Ĉar la societo jam posedas propran esp. presalfabeton, la nova redakta k mitato faros la eblon por plibonigi la enhavon, ankaŭ la formon de l'organo, se Ĉi tio permesas la financaj rimedoj donitaj por ĝi de la bulgaraj esperantistoj. Ni devas ankoraŭ atentigi Ĉiujn societajn membrojn, ke la ricevo de l'organo estas devigata por Ĉiu membro kaj por tio estas dezirinda, ke Ĉiu samideano pagante sian kotizaĵon, pagu samtempe sian abonon. Oni povas sin imagi la grandan utilecon por la organo kaj la societo, se Ĉiuj ĝisunaj 420 membroj pagus iliajn jarabonojn!

Ĉar la nova societa jaro komencas de 1-a de Septembro, Ĉiuj samideanoj kaj lokaj prop. komitatoj estas petataj de nun alsendi iliajn

novain kotizaĵojn, kiuj laŭ art. 22 de la regularo devas esti pagitaj plej malfrue ĝis la fino de Decembro, al s-ro G. Gaŝevski — librejo „Esperanto“, b. „Maria Luiza“ 46, Sofion. Ankaŭ al li devas esti sendataj ĉiuj monoj por helpoj, abonpagoj k. t. p. Ĉion koncerne la organon, sendu al s-ro Sim. N. Petkov, advokato, pl. „Sv. Nedelja“, 6, Sofion.

Ruse. Nia malnova pioniro s-ro subkolonelo Silvestriev fondis ankaŭ tie grupon (lokan propagandan komitaton) „Frateco“ kies prezidanto estas li kaj sekretario s-ro Grozev librovendisto. Li intencas dum Septembro malfermi kurson. Niajn gratulojn al la sindonemaj samideanoj!

Vidin. De s-ro Lazarov ni ricevis la jenan leteron: Granda estas la ĝojo pro tiel rapidega eldono de l'organo. La membroj de la grupo „Espero“ esprimas sian dankon al la C. P. K. por ĉi tia rapida decido kaj bondeziras al „Bulgara Esperantisto“ plenan sukceson kaj longan vivon La membroj de la grupo volas korespondadi kun samideanoj por perfektiĝi en Esperanto. Pri tio oni skribu al s-ro Vlad. Lazarov, str Borisova.

Karlovo. La grupo tre prosperas. La membroj atingis la ciferon 25. Raportanto: Iv. Dobrev.

La Budĝeto, kiun la kongreso akceptis por la 1919/20 societa jaro, estas la sekvanta:

Enspezoj:			**Elspezoj:**		
Kotizaĵoj	1.800·—	lv.	Presado de l'organo . .	5.000	lv.
Societaj eldonaĵoj .	100·—	„	Por ekspedo	300	„
De okazaj enspezoj	71·48	„	Kancelariaj elspezoj . .	1.000	„
Oferaĵoj, donacoj .	500·—	„	Por broŝuroj, flugfolioj k. a.	2.000	„
De abonoj ankoraŭ	2.000·—	„			
En kaso	4.028·52	„			
Entute . .	8.500·—	lv.	Entute . .	8.500	lv.

Vlad. Lazarov.

La kanto . . . .

(versaĵo en prozo.)

I.

Mi ofte pasis preter ŝi kaj haltiĝanta, mi aŭskultis kanton, ĝojegan voĉan kanton, kanton pri juneco, pri amo . . . Kaj la kanto portiĝis de facileta vento en nokta senvoĉo — animon tuŝis kaj koron ĝojigis. . . Ĉi tio reiĝis ĉiam, kiam mi pasis preter ŝi kaj ĉiutage mi preterpasis; dolĉaj tagoj estis ili! . . .

II.

Sed natendite, mi foriris je la urbo. Kaj sufiĈe longe mi forestis! Mi ne povis ĝui ŝian agrablegan kanton — vidadi ŝin . . .

Reveninta, mi ĝojege preterpasis ŝiajn fenestrojn, pensante aŭdi la samon . . . ve, nenion . . , Kvieta estis la interno. . regis la senvoĈo! La fenestroj estis kovritaj. — ĝi staras al oriento, eble ŝi timas la sunon kaj ne kuraĝas malkovri ĝin — mi pensis.

Pasinta duan fojon kaj haltiĝanta antaŭ ŝiaj fenestroj, mi aŭdis kanton, kvietan duonvoĈan kanton, pri fruemortinta juneco . . . Nur Ĉi tion mi aŭdis! . . .

III.

Ho ve! . . . baldaŭ mi sciiĝis, ke ŝi estas mortinta". . . kaj vere, mi jam neniam vidos ŝin! . . .

Kaj ofte mi. nokte aŭskultas de la interno de la Ĉambro la kanton pri fruemortinta juneco . . . ĝi plenigas animon mian je doloro . . . doloro pri la karega perdo . . . kaj ofte la buŝo ripetas: ŝi mortis . . .

Vidin 10/V 1917

Izolitajn sur monteto for
Ĉie blankajn vidas mi loĝejojn
Diru al mi, kiun mi ekcelu
Por ke laca trovu rifuĝejon!

Ĉie fremdon, fremdon mi renkontas
Fremdajn homojn, vortojn nebonkorajn
Haltis mi sur la kamparo. Ĉu ne
Sternis ĝi por mi tapiŝojn florajn.

PenĈo Slavejkov — tradukis Sentoplum.

Vivanta lingvo de vivanta popolo.

El la parolado de D-ro Edm. Privat Ĉe la esperantista kongreso en Barcelóno (Septembro 1909) eltiris P. Kolev.

. . . Estas utile klarigi la fundamentajn principojn, laŭ kiuj gvidiĝas kaj laboras la Internacia Instituto. Esperanton ĝi konsideras kiel vivantan lingvon de vivanta popolo. Oni ofte diras, ke nia lingvo estas artefarita kaj seka fabrikaĵo, ke ĝi ne povos vivi, Ĉar ĝi ne povos havi literaturon, ke lingvo povas vere vivi, nur se ĝi havas popolon por ĝin paroli kaj kanti kun amo kaj poezio.

Jes efektive, Ĉiu lingvo vivanta havas propran spiriton, ĝi reprezentas la sentojn kaj ideojn de la popolo, kiu ĝin parolas, kaj lingvo povas vivi nur per tiu propra spirito, kiu kreas ĝian literaturon. Pro tio, se D-ro Zamenhov estus nur lingvisto, li estus kreinta artefaritan lingvon, kiu eble restus senviva teoria projekto, kiel tiom da aliaj. Sed antaŭ ol esti lingvisto kaj vere antaŭ Ĉio, nia Majstro estas *homo*. En nian lingvon li jam de la komenco enblovis *homan* spiriton. En ĝi li verkis *homajn* poemojn. Kun ĝi ligis grandan ideon kaj noblan senton. Tiel kune kun la lingvo, li fondis popolon kaj, laŭ sia propra

konfeso, li fondis la lingvon nur pro kaj por tiu nova popolo. Kaj tiu popolo nun vivas kaj kreskas Ĉiujare; ĝi estas ni, esperantistoj Ĉiulandaj, kiuj amas Esperanton, Ĉar ĝi simbolas nian internan ideon kaj celon.

Kiu studis la historion de la lingvoj, tiu scias, ke la lingvoj vivas kaj evoluas nur dank'al *sentaj* movadoj, neniam dank'al decidoj de lingvistoj; Ĉiu scias, kiel la potenca movado komencita de Luther en Germanio progresigis la germanan lingvon, dum samtempe ĝi transformis muzikarton kaj kantadon Kiu konas la historion de la franca lingvo, tiu bone scias, kiel Ĉe la komenco de la lasta centjaro, Chateaubriand, per enkonduko de „nova sento" en la literaturon komencis la grandan sentimentalan movadon, kiu tiel riĈigis la francan llngvon kaj baldaŭ donis al ĝi Vicfor Hugo kaj lian skolon.

Nu, Ĉu la unua verso de nia amata himno ne estas: „En la mondon venis nova sento . . ."?

Jes, tiu „nova sento" estas la kaŭzo, kial nia lingvo allogis tiel fervoran armeon da adeptoj. Tiu „nova sento" donas al la esperantista popolo ĝian entuziasmon, ĝiajn kantojn, ĝian poezion, ĝiajn simbolojn, ĝian literaturon, unuvorte Ĉion, kio faras la vivon de iu nacia lingvo. Same kiel patriotizmo kreskigas — kaj eĈ kelkfoje revivigas — naciajn lingvojn, same nia esperantismo, kiun simbolas la verdstela flago, kreskigas kaj vivigas nian karan lingvon.

Sed dum ofte la nacia patriotismo devigas homojn malami aliajn naciojn kaj aliajn lingvojn, nia internacia kaj pura esperantismo nur igas nin ami Ĉiujn popolojn kaj iliajn lingvojn.

Tiel Ĉiu homo povas — kaj Ĉiu ja devus — ami samtempe sian nacian lingvon por sia kara patrujo kaj Esperanton por la tuta homaro.

Tiuj ideoj kaj sentoj ja kreis nian ankoraŭ malgrandan literaturon kaj de dudek jaroj, sur la lipoj kaj sub la plumo de l'esperantistoj, nia lingvo viviĝis kaj kreskis Ĉiutage pli kaj pli. Nun ĝi estas vere vivanta lingvo, kiu komencis saman naturan evoluon, kiel la aliaj lingvoj kaj kiun de nun neniu en la mondo povas arbitre tuŝi.

Nun, ke tiun rezultaton ni ŝuldas sole kaj entute al la interna ideo kaj spirito de Esperanto, tion Ĉiam memoru bone Ĉiuj, kiuj lernas nian lingvon, eĈ se ili ne komprenas aŭ ne akceptas tiun senton de l'esperantismo.

Oni devas gratuli la organizintojn de la Floraj Ludoj. Ankaŭ oni devas danki al tiu admirinda organizaĵo U. E. A., kiun *D*-ro Zamenhov nomis „La vera realigo de esperantismo", kaj kiu fariĝis la plej firma garantio kontraŭ Ĉiuj atakoj al nia lingvo.

Nia lingvo estas sur la plej bona vojo. Ni povas iri antaŭen kun plej plena fido kaj renovigita kuraĝo, Ĉar en niaj koroj kuŝas nun definitiva certeco pri la vivo de Esperanto.

Vivos Esperanto por la bono de l'homaro . . . .

Печатница на Акцион. Дружество „Радикалъ".